

Pri la ĉamoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 527, 1981.10.29 & 31

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La ĉamoj ĉiam multnombris en la montoj de Svislando. Kontraŭe al la ibeksoj, tiuj sovaĝaj kaproj kun duoncirkla kornoj, kiuj restadas en tre limigita teritorio, la ĉamoj ĉiutage migradas sur vastegaj areoj. Tuj kiam ili vidas homojn, ili forkuras. Tial, kvankam oni ĉiam ĉaspersekutis ilin, ili neniam malaperis kiel la ibeksoj.

A.- En la literaturo la ĉamoj estas ligitaj al la pintaj montoj. Sed fakte tiuj bestoj rifuĝas sur la montojn ĉefe por fuĝi la homojn kaj ties brutarojn: la bovinojn, la ŝafarojn kaj kaprinojn, kiuj invadas iliajn teritoriojn. La ĉamoj tendencas rekonkeri tiujn ĉi herbejojn tuj kiam la brutaroj ilin forlasas, je la vesperiĝo, kaj ĉefe komence de la aŭtuno, kiam la brutojn oni revenigas en la valojn. Kaj ĝis la fundo de tiuj valoj migradas la ĉamoj. Frumatene aŭ vespere, oni vidas ilin paŝti borde de la arbaroj, kien ili rifuĝas dum la tago.

Cl.- En la montaro Ĵuraso la ĉamoj preskaŭ komplete malaperis ekde la fino de mezepoko. Sed tamen de tempo al tempo oni renkontis izolitajn individuojn, kiuj verŝajne venis migre el la Alpoj. Tuj kiam la protekto de la ĉamoj estis leĝe proklamita kaj draste observita komence de la dudeka jarcento, reformiĝis en la plej konvenaj lokoj ĉam-triboj, ĉu tute nature, ĉu pro la interveno de naturprotektantoj, kiuj ilin alportis el la Alpoj.

A.- En la ĵurasa monto Le Creux-du-Van, kiu estas vasta protektejo kun giganta rokcirko tre konvena por la ĉamoj kaj la ibeksoj, oni reenkondukis inter 1950 kaj 1955 dekok ĉamojn, kiujn oni kaptis en Valezo, Grizono kaj Berna Oberlando. Tiuj bestoj elektis kiel preferatan loĝlokon la fundon de la rokcirko, ŝtonaron ĝenerale en la ombro. En tiu sensuna regiono ili rapide multiĝis, kaj nun estas pluraj miloj da individuoj, kiuj invadas la tutan regionon.

C1.- Fakte, krom la homoj, la solaj malamikoj de la ĉamoj estas la linksoj kaj la lupoj. Lupojn oni ne povas reenkonduki, sed linksojn jes. En la natur-protektejon Le Creux-du-Van du paroj da linksoj estis alportitaj en 1974 kaj 1975. Tiujn ĉi bestojn oni kaptis en Ĉeĥoslovakio. Laŭ la observoj, unu paro restis en la protektejo kaj unuaj naskiĝoj okazis jam la postan jaron. La alia paro iris vivi en apuda valo **Le Val-de-Travers**. Se tiuj ĉi linksoj ne povas formanĝi la tro abundan ĉamaron, ili almenaŭ havas pozitivan influon, devigante la ĉamojn disiĝi etgrupe. Oni ne vidas plu tiujn ĉi trupojn, kiuj arigis plurajn centojn da individuoj.

A.- Tre verŝajne la linksoj atakas antaŭ ĉio la malbonfartajn ĉamojn, kaj ĉefe inter ili la plej malfortajn idojn. Ili tiel ludas ege favoran rolon malsanpreventan.

C1.- Bedaŭrinde la enkonduko de la linksoj havis malfavoran influon sur alian bestaron. Ili grandparte malaperigis la marmotojn. Fine de la pasinta jarcento 43 marmotoj estis alportitaj el la Alpoj, kaj ili formis pluraĵn tribojn, kiuj normale disvolviĝis. Sed tre verŝajne tiuj bestoj estas frandaĵo por la linksoj, kaj ili tendencas malaperi. Estas malfacile interveni en la naturon, profite al ĉiuj bestoj.

A.- Okaze de migrado en la Alpoj, kiun organizis la esperanto-junularo de Svislando, ni havis la okazon observi interesan aferon. Sur nevajo, tio estas kampo kovrita de malnova neĝo, ĉamo faris grandajn saltojn. La pentristo Robert Hainard, kiu estas granda bestobservanto, desegnis similajn dancojn, kiujn li tiel priskribas:

C1.- La virĉamoj ludas sur la neĝkampoj aŭ nevajoj; ili alvalas turnante sur sin mem, farante specon de valso, balancante la kapon kaj stariĝante kelkfoje sur la malantaŭaj kruroj. Kiam ili tiel alvenas fine de la neĝkampoj, ili tuj realsupras, kaj rekomencas la ludon, kiun ili ĝenerale efektivigas duope.

A.- Aliaj observantoj rakontas, ke kelkfoje la ĉamoj glitigas sin sur la postaĵo, sur la ventro aŭ sur la flanko. Ŝajnas, ke tiuj ludoj ĉefe okazas sur la nevajoj, kiuj interrompas la vastajn stonkampojn. Povas esti, ke kiam la ĉamoj forlasas la ŝtonarojn, kie ili devas tre atente marŝi, por ne vundiĝi, ili sentas veran movliberiĝon, kaj ke ili esprimas sian ĝojon povi fine libere kuri, per la valsoj kaj saltoj, kiujn ni ĵus priskribis.

C1.- La ĉamoj kaj la ibeksoj, almenaŭ somere, okupas la samajn teritoriojn. Vintre la ĉamoj migras en pli mildajn lokojn, la sovaĝaj kaproj kontraŭe fidelas al sia loĝloko. Ĉiuj observoj montras, ke kiam ibekso kaj ĉamo renkontiĝas, estas ĉiam la ĉamo kiu retiriĝas forlasante la lokon. Ni ne forgesu, ke ibekso estas kvarfoje pli peza ol ĉamo.

A.- La vivo de la ĉamoj estas pli bone konata ol tiu de la ibeksoj, kvankam la sovaĝaj kaproj estas malpli fuĝemaj ol la ĉamoj.

Cl.- La ĉefaj kaŭzoj estas unue, ke la ĉamoj estas multe pli multnombraj ol la ibeksoj, kaj due, ke la ĉamoj estas tagbestoj. La intima vivo de la ibeksoj disvoiviĝas nokte. Kontraŭe tage disvolviĝas tiu de la ĉamoj. Dum la seksarda sezono, estas facile observi la morojn de la ĉamoj, dum tiuj de la ibeksoj estas misteraj.

A.- La ĉamoj vivas en grandaj aroj. La inoj kaj la idoj restadas meze de la grupo, kaj la viroj konstante turnas ĉirkaŭ la inoj kaj idoj, kvazaŭ ili volus per tio protekti la etulojn kaj iliajn patrinetojn. Kaj tiuj viroj senĉese batalas, sed veraj luktoj okazas nur inter sampezaj individuoj. Okaze de malsameco, la junaj bestoj tuj forkuras.

Cl.- Ekde la mezo de novembro ĝis la mezo de decembro la virĉamoj fariĝas seksardaj. Ili elmontras la langon kaj blekadas. Sur la individuoj de ambaŭseksoj glandoj, kiuj troviĝas malantaŭ la kornoj, sekretas odorplenan grason, kiu tre verŝajne havas ekcitan influon.

A.- La plej fortikaj virĉamoj provas forpeli la junajn virojn, sed ili malofte sukcesas. Tiuj junaj viroj grupiĝas, kaj are ili invadas la inaron, kun kiu ili sekskuniĝas, je la granda kolero de la pli fortikaj viroj, kiuj alkuras por ilin anstataŭi. Tute ne ekzistas en tiuj vastaj trupoj hierarkio bone difinita, kiel ĉe la ibeksoj.

Cl.- La ĉaminoj naskas fine de aprilo aŭ komence de majo. Ili izoliĝas en buskaj regionoj. Ĉamobservanto nomata Luisier tiel priskribas naskon, kiun li povis vidi:

A.- "Mi atente ekzamenis la movojn de ĉamino. Ili ŝajnis al mi [...]

(mankas la sekvo de la prelegteksto)